

**DIA REGNO**

ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

◉ dumonata kristana revuo en esperanto ◉ n-ro 2 (845) 2004 ◉

## ESPERANTE KAJ EKUMENE



Aperis la memorlibro  
honore al  
Adolf BURKHARDT

## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta  
kun UEA

**Celo:** Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj  
landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri  
Jesuo Kristo.

**Prezidanto:** Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerk  
☎ +31 251 231941;  
✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

**Sekretario:** Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn,  
Nederlando; ☎ +31 1724 20222;  
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

**Kasisto:** Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074  
Heilbronn, Germanio; ☎ +49 7131 162688;  
✉ SLKrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume  
€ 20,- ☉ Membro-subtenanto € 30,- ☉ Nura  
abono: pagante rekte al KELI € 16,- ☉ pagante al  
Libroservo € 18,- Sendoj de okcidentaj monbiletoj  
per registrita letero al la kasisto de KELI ☉ Se  
estas en via lando UEA—poŝtĵirkonto (informiĝu  
ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto  
kelk-p de KELI ☉ Nederlanda poŝtĵirkonto de  
KELI: 5506132.

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Prè-Ventenet, FR 86340  
Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0)5 49 46 80 21;  
✉ diaregno@altern.com.

**Abonprezo** sen membreco en KELI: € 16,- aŭ  
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la  
kasisto de KELI (vidu supre).

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la  
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe,  
ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ  
traduko oni sendu al la Redaktoro.**

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado  
kaj ekspedado:**

Eldonejo HEJME Kazimierz LEJA  
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando  
☎ +48 32 2650038; ✉ esperanto@hejme.e-tools.pl

## Enhavtabelo

- 27 Esperante kaj ekumene
- 29 El la duakanona libro 2 (4) Ezra
- 32 Kion vi petus?
- 33 La homecigo de la homaro
- 35 Ĉu la protestanta Eklezio en Nederlando  
restu senepiskopa?
- 36 Kiu pleje donacis?
- 37 Dieco kaj homeco de Jesuo Kristo
- 38 Drama atesto
- 39 Forkuro
- 40 Riski paŝoj de kredo
- 41 Mardo (parto unua)
- 48 Kion vi tie havas en via mano?

## Redaktoraj vortoj

Karaj belegantoj,

Parto de nia numero rilatas al la im-  
pona kolekto de tekstoj, kiuj konsisti-  
gas la libron eldonitan de Iltis por ho-  
nori nian longdaŭran prezidinton Adolf  
BURKHARDT. KELI aĉetis stokon. La li-  
bro estas havebla ĉe la kasisto. Espereble  
ankaŭ dum la kongreso.

Antaŭnelonge, alia libro estas haveb-  
la. Temas pri la nova eldono de la Biblio,  
kun la deŭterokanonaj libroj, en tradu-  
ko de Gerrit BERVELING. De li ni publi-  
kigas pliajn verkojn: tradukon de libroj  
de kroma kanono. Ankaŭ pecon, kie li  
iom rakontas sian vivon de pastoro.

Mi esperas, ke la enhavo de nia revuo  
estas tia, ke post kelke da jaroj, vi reve-  
nos al ĝi, pensante: kiel bone ke ĝi estas,  
se ĝi ne estus, tion mi ne sciis, tion mi  
ne pensus, tiel mi ne kredus.

Bonajn paskotagojn al vi.

Philippe COUSSON

## ESPERANTE KAJ EKUMENE

Sub la titolo „Esperante kaj Ekumene”  
eldonejo ILLTIS freŝdate aperigis Festlibron  
por omaĝe honori nian riĉmeritan ekspre-  
zidanton Pastoro Adolf BURKHARDT. La  
10an de aprilo li, bedaŭrinde grave malsana,  
esperas atingi la aĝon de sepdek kvin  
multflankaj kaj plentaskaj jaroj.

La 17a de januaro 2004 estis tago histo-  
ria en Weilheim a/d Teck, tago konsekven-  
ce neforgesebla. Tiam okazis impona cele-  
bro, en kiu oficiale transdoniĝis al pasto-  
ro BURKHARDT la menciita *Festlibro*. So-  
nis muziko. Elokventis paroladoj. Abundis  
salutoj, bondeziroj kaj dankvortoj. Ĉeestis  
parencoj, geamikoj, altaj gastoj, oficialuloj,  
la vilaĝestro kaj multe da aliaj aŭtoritatuloj,  
muzikistoj, la editoro, ktp. Kompreneble  
estis por nia plej kara frato vere kulmina  
tago en lia esperantista vivo.

Al la gratuloj, kiuj Teck-torente fluis al  
Weilheim, mi volonte aldonis la miajn kaj  
tiujn de ĉiuj KELI-anoj, kiuj certe fieras pri  
tiu unika evento. Ke la ĉielo malavare be-  
nu kaj anĝelflugile protektu la amatan edzo-  
paron Adolf kaj Grete kaj ĉiujn iliajn ge-  
karulojn en la proksima tempo!

„Esperante kaj Ekumene” estas valora  
kaj varia verko, al kiu kontribuis multe da  
kunlaborintaj personoj konataj kaj mal-  
pli konataj. Laŭ rubrikoj oni povas dist-  
ingi jenajn partojn: Enkonduke, Teologio,  
Esperantologio, Interlingvistiko, Literatur-  
scienco, Bibliografio de la verkaro de Adolf  
BURKHARDT. Laŭ alfabeto ordo oni ren-  
kontos la nomojn de Otto BACK, Detlev  
BLANKE, Marjorie BOULTON, Philippe CO-  
USSON, Constantin DOMINTE, Bernhard  
EICHKORN, Claude GACOND, Toimi Ilma-  
ri HAAPALAINEN, Reinhard HAUPENTHAL,  
Geoffrey KING, Albrecht KRONENBERGER,  
Andreas KÜNZLI, Ernst LEUZE, Regina LO-

RÖSCH, Carlo MINNAJA, Iosif E. NAGY, Leif  
NORDENSTORM, Bernhard PABST, Richard  
SCHNELLER, Annakris SZIMKAT kaj Jacqu-  
es TUINDER.

Tre mi esperas, ke pluraj el niaj memb-  
roj havos la eblon mendi kaj legi ĉi tiun re-  
komandindan kaj havindan verkon 368-  
paĝan. La prezo ne estas modesta: 45  
EUR.

Jacques TUINDER



Karaj gefratoj,

hieraŭ mi partoprenis la kortuŝan ce-  
remonion okaze de solenaĵo por transdo-  
ni la festlibron „Esperante kaj Ekumene”  
al Adolf BURKHARDT. La libro estas eldo-  
nita por honorigo de Adolf okaze de la 75-  
jariĝo en aprilo.

En la eklezia komuneca domo kolektiĝis  
pli ol 100 gratulantoj. Bernhard EICHKORN  
gvidis tra la programo (rigardu la aldonajon),  
ties ĉefa parto estis la laŭdatio de la verkinto  
Reinhard HAUPENTHAL kaj la transdono de  
la libro pere de Irmu HAUPENTHAL, kiu gvi-  
das la eldonejon *Edition Iltis*.

Mi povis saluti la partoprenantojn nome  
de KELI kaj esprimi nian dankemecon pri  
la honorigo de nia kara frato. Adolf povis  
ĉeesti, spirite li kapablis sekvi kaj komen-  
ti la honorigon. Grete gvidis lin en la salo-  
non, kiun li malrapide paŝante mem povis  
eniri. La tuta solenaĵo estis altnivela kaj ga-  
ja malgraŭ la malsano kaj la antaŭvidebla  
sorto de Adolf.

Salutas vin ĉiuj korege

Siegfried KRÜGER

PS.: KELI aĉetis 30 de la libroj. Oficia-  
la vendoprezo estas 45 EUR, ni ricevis ra-  
baton kaj pagis 30 EUR po ekzemplero. Ni  
ankoraŭ decidis, al kiu ni donacos la libron.  
Ĉi-okaze kontaktu min, se vi havas intere-  
son akiri la libron.

## I. Tabula Gratulatoria

### II. Enkonduke

Reinhard HAUPENTHAL: *La kredo movis montojn*

Regina LORÖSCH: *Biografia skizo pri Adolf Burkhardt*

### III. Teologio

Philippe COUSSON: *Teologia dokumentado en Esperanto?*

Bernhard EICHKORN: *Esperanto en la servo de la ekumena movado*

T. I. HAAPALAINEN: „Mi ne komprenas!” — *Unu himno-historio*

Albrecht KRONENBERGER: *Kiu kantas, preĝas duoble*

ERNST LEUZE: *La stelo siringoviola. Projekto pri la ekumena himnaro Adoru*

Leif NORDENSTORM: *Ĉu eblas studi religihistorion en Esperanto?*

Jacques TUINDER: *Adolf Burkhardt: esperantista pastoro kun ekumena koro*

### IV. Esperantologio

Claude GACOND:

Geoffrey KING: *Indekso por la Klasifo de Esperantaj temoj de Montagu C. Butler (1887-1970)*

Andreas KÜNZLI: *Kristanismo kaj planlingvoj en Svislando*

Leif NORDENSTORM: *Otto Zeidlitz (1860-1943): pastro, pedagogo kaj Esperanto-pioniro*

Bernhard PABST: *Marie Hankel (1844-1929): Poetino, Organizantino, Feministino*

Annakris SZIMKAT: *Dokumentoj ĉirkaŭ la morto de unu biblioteko*

### V. Interlingvistiko

Otto BACK: *Lingvo-inventado en la Danuba monarkio (1821-1918)*

Detlev BLANKE: *Ernst Beermann (1853-*

*1936): liaj interlingvistikaj konceptoj kaj planlingvaj projektoj*

Constantin DOMINTE; Iosif NAGY: *Interlingvistiko kaj esperantologio en Rumanio*

Reinhard HAUPENTHAL: *La pastro de Litzelstetten. Decenio (1875-1885) en la vivo de Johann Martin Schleyer (1831-1912)*

### VI. Literatur-scienca

Marjorie BOULTON: *Romanista koncepto de ideala kristana pastoro: Sinjoro Eden de Charles Reade (1814-1884)*

Carlo MINNAJA: *La beletra faceto de la revuo „Horizonto” dum la hispana periodo (1976-1980)*

Richard SCHNELLER: *Konciza historio de la presarto kun aparta konsidero de la Esperanto-literaturo*

### VII. Bibliografio de la verkaro de Adolf BURKHARDT

(Reinhard HAUPENTHAL)

### VIII. Notoj pri la kunlaborantoj

### IX. La sponsoroj

#### Atentu, se vi ĝiras monon al la UEA-konto <kelk-p> de KELI!

Ricevinte kontoeltiron de UEA (malofte) la KELI-kasisto ofte devas diveni, de kiu venas la mono kaj kiucele ĝi estas. Eĉ telefoni al la UEA-kasisto kellefoje necesas. Vi plifaciligas mian laboron, se vi informas min per letero samtempe kun la ĝirado.

Siegfried KRÜGER  
kasisto de KELI

## EL LA DUAKANONA LIBRO 2 (4) EZRA\*

tradukis el la Latina Gerrit BERVELING

1:1 Libro de la profeto Ezra, filo de Seraja, filo de Azarja, filo de Ĥilkija, filo de Ŝalum, filo de Cadok, filo de Aĥitub, 2 filo de Aĥia, filo de Pineĥas, filo de Eli, filo de Amarja, filo de Azija, filo de Marimot, filo de Arna, filo de Uzi, filo de Borit, filo de Abiŝua, filo de Pineĥas, filo de Eleazar, 3 filo de Aaron, el la tribo de Levi, kiu estis kaptito en la lando de la Medoj, en la regno de Artaĥŝast, la reĝo de la Persoj.

4 Venis la parolo de la Sinjoro al mi, dirante: 5 Iru, sciigu al Mia popolo iliajn malbonagojn kaj la maljustaĵojn de iliaj idoj, kiujn ili kulpas kontraŭ Mi, tiel ke ili sciigu al la infanoj de siaj infanoj, ke, 6 ke la pekoj de iliaj patroj kreskis ĉe ili; forgesante pri Mi, ili ja donis oferojn al fremdaj Dioj. 7 Ĉu ne Mi elkondukis ilin el la lando Egipcia, el la domo de sklaveco? Sed ili kolerigis Min kaj malŝatis Miajn konsilojn. 8 Sed vi, elŝiru harojn de via kapo, kaj elŝutu ĉiun malbonon super ilin, ĉar ili ne obeis Mian leĝon; estas ja popolo sendisciplina. 9 Kiel longe Mi ilin eltenos — ilin, al kiuj tiom da bono Mi faris? 10 Multajn reĝojn pro ili Mi renversis: Faraonon kun ties filoj kaj lian tutan armeon Mi batis; 11 ĉiujn gentojn Mi neniiĝis antaŭ ili, kaj en oriento Mi dispelis la popolon de du provincoj, Tiro kaj Cidon, kaj ĉiujn iliajn kontraŭulojn Mi mortigis.

12 Sed vi, parolu al ili kaj diru: Jen diras la Sinjoro: 13 Nepre nur Mi tra-

irigis vin tra la maron, kaj sekurajn ebenajojn Mi montris al vi en la dezerto; gvidanton Mi donis al vi: Moseon, kaj Aaronon, la pastron. 14 Lumon Mi donacis al vi per fajra kolumno, kaj grandajn mirindaĵojn Mi plenumis ĉe vi. Sed vi forgesis Min, diras la Sinjoro.

15 Jen diras la ĉiopova Sinjoro: La koturnoj estis signo por vi, tendumejojn Mi donis por ŝirmi vin, sed tie vi plendadis. 16 Vi ne triumfis je Mia nomo, neniigante viajn malamikojn, sed vi ĉiam ankoraŭ grumbladas. 17 Kie restis la bonfaroj, kiujn Mi montris al vi? Ĉu en la dezerto, malsatante kaj soifante, vi ne alvokis Min, 18 dirante: Kial Vi kondukis nin en ĉi tiun dezerton, por mortigi nin? Estus pli bone por ni, resti sklavoj en Egiptujo ol morti en ĉi tiu dezerto! 19 Sed Mi kompatis pri via ĝemado kaj donis manaon al vi por manĝi: pannon de anĝeloj vi manĝis. 20 Ĉu Mi ne fendis rokon, kiam vi soifis: kaj jen fluus akvo ĝi satigo! Pro la brula varmo Mi kovris vin per arabaj folioj. 21 Mi disdonis inter vi riĉajn landojn: Kanaanidojn, Perizidojn, kaj Filiŝtojn Mi forpelis de antaŭ via vizaĝo. Kion Mi ankoraŭ do faru? diras la Sinjoro.

22 Jen diras la ĉiopova Sinjoro: Kiam en la dezerto vi estis ĉe la amara rivero, kaj vi blasfemis Mian nomon, 23 Mi ne sendis al vi pro viaj blasfemoj la fajron, sed ĵetante lignon en la akvon, Mi faris ĝin dolĉa. 24 Kion Mi faru, ho Jakob? Vi ne volis auskulti Min, Jehu-

\*La ĉapitroj 1 kaj 2 de tiu ĉi libro foje estas kune indikitaj kiel 5 Ezra.

da. Mi transiros al aliaj popoloj kaj donos Mian nomon al ili, por ke ili gardu Miajn ordonojn. 25 Ĉar vi forlasis Min, ankaŭ Mi forlasos vin; kiam vi imploros de Mi pardonon, Mi ne kompatos pri vi. 26 Kiam vi alvokos Min, Mi ne elaŭdos vin. Ĉar vi malpurigis viajn manojn per sango, kaj viaj piedoj estas senlacaj por plenumi murdojn. 27 Estas kvazaŭ vi forlasis ne Min, sed vin mem, diras la Sinjoro.

28 Jen diras la ĉiopova Sinjoro: Ĉu Mi ne petegis vin, kiel patro siajn filojn, kiel patrino siajn filinojn, kaj kiel nutristino siajn infanetojn, 29 ke vi estu por Mi Mia popolo, vi Miaj infanoj — kaj Mi via patro? 30 Mi kunigis vin sub Miajn flugilojn, kiel kokino siajn idetojn. Sed nun, kion Mi faru pri vi? Mi forpelos vin de antaŭ Mia vizaĝo. 31 Kiam oferojn vi alportos al Mi, Mian vizaĝon Mi forturnos de vi; ĉar viajn festojn, monatkomencojn kaj cirkumcidojn en la karno Mi repudias. 32 Miajn servantojn, la profetojn, Mi sendis al vi, sed vi kaptis kaj mortigis ilin, kaj iliajn korpojn vi disŝiris: Mi repostulos de vi ilian sangon, diras la Sinjoro.

33 Jen diras la ĉiopova Sinjoro: Via domo estas dezerta, kaj vin mem Mi disblovos, kiel la vento la pajlon. 34 Viaj filoj ne havos idaron, ĉar kune kun vi ili ne atentis Miajn ordonojn, kaj faris kio estas malbona antaŭ Mi. 35 Viajn loĝejojn Mi transdonos al popolo venonta; kiuj, ne aŭdante Min, kredos; al kiuj signojn Mi ne donis, sed tamen ili faros, kion Mi ordonis. 36 Profetojn ili ne vidis, sed ili rememoros kion instruis <la profetoj> en tempoj antikvaj.

37 Mi atestas pri la graco de tiu venonta popolo. Iliaj etuloj jubilos kun ĝojo; kvankam ili ne vidos Min per korpaj okuloj, tamen en la spirito ili kredos Miajn dirojn. 38 Kaj nun, patro<sup>1</sup>, rigardu fiere, kaj vidu la popolon venanta de oriento. 39 Al ili Mi donos kiel gvidantojn Abrahamon, Izaakon, kaj Jakobon, kaj Hoŝean, Amoson, Miĥan, Joelon, Obadjan, Jonan, 40 Naĥumon, Ĥabakukon, Cefanjan, Ĥagajon, Zeĥarjan, kaj Malaĥion, kiu ankaŭ nomiĝas sendito de la Sinjoro.

2:1 Jen diras la Sinjoro: Ĉi tiun popolon Mi elkondukis el la sklaveco; ordonojn Mi donis al ili per Miaj servantoj, la profetoj, sed ili ne volis aŭskulti kaj vanigis miajn konsilojn. 2 La patrino, kiu naskis ilin, diras: Iru, miaj infanoj, ĉar vidvino mi estas kaj forlasita. 3 Mi edukis vin kun ĝojo, sed mi perdis vin en funebro kaj tristeco, ĉar vi pekis antaŭ la Sinjoro Dio, kaj vi faris malbonon antaŭ mi. 4 Sed nun, kion mi faru por vi? Ĉar vidvino mi estas kaj forlasita. Iru, infanoj, kaj petu pardonon de la Sinjoro. 5 Sed vin, patro, Mi alvokas por aldoni vian ateston al la ŝia pri ŝiaj infanoj, ke ili ne volis servi al Mia interligo, 6 tiel ke vi konfuzu ilin: prirabiĝu ilia patrino, kaj idaron ili ne havu. 7 Ili dispeliĝu inter la gentoj, iliaj nomoj malaperu de la tero, ĉar Mian interligon ili malŝatis.

8 Ve al vi, Asirio, ĉar la maljustulojn vi tenas kaŝitaj ĉe vi! Ho malbona popolo, memoru, kion Mi faris al Sodom kaj Gomora, 9 kies lando kuŝas en peĝoblejoj kaj cindramasoj. Same Mi faros al tiuj, kiuj ne aŭskultos Min, diras la

ĉiopova Sinjoro.

10 Jen diras la Sinjoro al Ezra: Heroldu al Mia popolo, ke Mi donos al ili la regnon de Jerusalema, kiun unue Mi prezentis al Izrael. 11 Mi eĉ reprenos al Mi Mian gloran ĉeeston, kaj al <la novaj> Mi donos la eternajn loĝejojn, kiujn <origine> Mi preparis por <Izrael><sup>2</sup>. 12 La arbo de la vivo donos al ili bonodoran unĝventon, kaj ili ne bezonos klopodi nek laciĝi. 13 Iru, kaj vi ricevos, tial preĝu, ke via mallonga tempo fariĝu ankoraŭ malpli longa: jam pretas por vi la regno: vigilu! 14 Ateste alvoku, alvoku ĉielon kaj teron: Mi forigis la malbonon kaj kreis la bonon, ĉar Mi estas la vivanta, diras la Sinjoro.

15 Patrino<sup>3</sup>, brakumu viajn infanojn, eduku ilin en ĝojo kiel la kolombo, firmigu iliajn paŝojn, ĉar vin Mi elektis, diras la Sinjoro. 16 La mortintojn Mi starigos de iliaj lokoj, kaj el iliaj tomboj Mi elkondukos ilin, ĉar Mian nomon Mi rekonas en ili. 17 Ne timu, patrino de idaro, ĉar Mi elektis vin, diras la Sinjoro. 18 Mi sendos al vi por helpi Miajn servistojn Jesaja kaj Jeremia, laŭ kies konsiloj Mi sanktigis kaj preparis por vi dek du arbojn, pezajn de diversaj fruktoj; 19 kaj same multajn fontojn, kiuj fluas je lakto kaj mielo, kaj sep grandegajn montojn, sur kiuj kreskas rozoj kaj lilioj, per kiuj viajn infanojn Mi plenigos je ĝojo.

20 Juste traktu la vidvinon, defendu la orfon, donu al la povrulo, vestu la nudan, 21 prizorgu la vunditan kaj malfortan, ne primoku la lamulon, ŝirmu la kriplan, kaj alvenigu la blindan por vidi Mian lum-brilon. 22 Protektu la ol-

dulon kaj la junulon inter viaj muroj. 23 Kie mortintojn vi trovos, entombigu ilin kaj metu signon super ili, kaj Mi donos al vi unuaecon ĉe la resurekto. 24 Estu kvieta kaj ripozu, Mia popolo, ĉar venos via ripozo. 25 Nutru viajn infanojn kiel bona nutristino, firmigu iliajn piedojn. 26 Neniu el la servantoj, kiujn Mi donis al vi, pereos, ĉar Mi repostulos ilin el via nombro. 27 Ne estu zorgoplena, ĉar kiam venos la tago de premateco kaj zorgoj, ploros aliaj kaj <ili> estos tristaj, sed vi estos gaja kaj ĝojos abundecon. 28 La nacioj ĵaluzos, sed povos nenion kontraŭ vi, diras la Sinjoro. 29 Miaj manoj vin ŝirmos, por ke viaj idoj ne vidu Geĥenon. 30 Estu ĝoja, patrino, kune kun viaj infanoj, ĉar Mi vin savos, diras la Sinjoro. 31 Memoru viajn dormantajn infanojn<sup>4</sup>, ĉar tiujn Mi elkondukos el la kaŝitejoj de la tero, kaj Mi montros kompatemon al ili, ĉar kompatema Mi estas, diras la ĉiopova Sinjoro. 32 Brakumu viajn infanetojn ĝis Mi venos, kaj sciigu kompaton al ili, ĉar tre akvoriĉaj estas Miaj fontoj, kaj Mia graco ne mankos.

33 Mi, Ezra, ricevis ordonon de la Sinjoro sur la monto Horeb, ke mi iru al Izrael. Kiam mi venis al ili, ili malakceptis min, kaj malŝatis la ordonon de la Sinjoro. 34 Tial mi diras al vi, ho nacioj kiuj aŭdas kaj komprenas: Atendu vian paŝtiston: eternan ripozon li donos al vi, ĉar tiu, kiu venos je la fino de la epoko, estas proksima. 35 Estu preparitaj por la premio de la regno, ĉar eterna lumo lumos super vi por eterne. 36 Fuĝu la ombron de ĉi tiu mondo, kaj ricevu la ĝojon de via gloro. Publike

<sup>1</sup>Tekstvariaĵo: frato. La alparolato devas esti Ezra. Dio kvazaŭ donas al li la titolon 'patro de la popolo'. Vidu ankaŭ en 2:3.

<sup>2</sup>La Latina teksto diras: por ili. Aliaj malnovaj versioj ĉi tie havas: por Izrael.

<sup>3</sup>Probable la eklezio.

mi atestas pri mia Savanto<sup>5</sup>. 37 Akceptu lin, kiun indikis la Sinjoro, kaj estu ĝojaj, dankante al Li, kiu vin vokis al la ĉiela regno. 38 Leviĝu, ekstaru, kaj vidu kiom estas signitaj por la manĝo de la Sinjoro. 39 Kiuj foriris el la ombro de ĉi mondo, ricevis lum-brilajn tunikojn de la Sinjoro. 40 Akceptu, Cion, vian plenan nombron, kaj fermu la liston de la blanke-vestitoj, kiuj fidele plenumis la leĝon de la Sinjoro. 41 Plena nun estas la nombro de viaj filoj, kiujn vi tiom sopiris, Preĝu pri la Regno de la Sinjoro, por ke sanktiĝu via popolo, kiu estis vokita de-komence.

42 Mi, Ezra, vidis sur monto Cion grandan amason, kiun mi ne povis nombri, kaj ĉiuj laŭdis la Sinjoron per himnoj. 43 Kaj meze de ili troviĝis junulo de impona alteco, pli alta ol ili ĉiuj, kaj sur ĉiujn iliajn kapojn li metis kronojn, unuope, sed la estis pli alta ol ĉiuj. Kaj mi estis mirigita. 44 Tiam mi pridemandis la anĝelon, kaj diris: Kiuj estas ili, sinjoro? 45 Kaj li respondis al mi: Tiuj estas, kiuj demetis sian morteman tunikon kaj sin vestis per la senmorta, kaj konfesis la nomon de Dio; nun ili estas kronataj, kaj ricevas palmbranĉojn. 46 Kaj mi diris al la anĝelo: Kiu estas tiu junulo, kiu surmetas al ili la kronojn, kaj kiu donas la palmbranĉojn en iliajn manojn? 47 Responde li diris al mi: Tiu estas la filo de Dio, kiun en ĉi mondo ili konfesis. Mi komencis laŭdegi ilin, kiuj rezistis tiel kuraĝe pro la nomo de la Sinjoro. 48 Kaj tiam la anĝelo diris al mi: Iru, kaj heroldu al mia popolo, kiajn miraklojn de Dio vi vidis, kaj kiom.

<sup>4</sup>En la morto.

<sup>5</sup>Alla traduko: mi kiel ateston alvokas mian Savanton.

## KION VI PETUS?

*En tiu nokto, Dio aperis al Salomono, kaj diris al li: Petu kion Mi donu al vi. Kaj Salomono diris al Dio: ...donu al mi nun saĝecon kaj sciadon, por ke mi povas regi tiun Vian popolon... (2 Kron. 1:7-10).*

Se Dio donus al vi oportunon peti de Li kion ajn, kion vi petus? Salomono trovis sin en tia situacio. Li ĵus fortiĝis kiel reĝo de Izrael. Dum unu el liaj diservoj, Dio aperis al li, kaj diris al li peti ion ajn kion li volis. Oni atendas, ke li, kiel nova reĝo, petus venkon sur siaj malamikoj konataj kaj nekonataj (efektive, ili abundis tiutempe). Alie, li povus peti riĉon kaj renomon. Tamen, li ne petis por tio. Anstataŭe, li unue dankis Dion por tio kion Li faris por lia familio, kaj poste petis saĝecon kaj sciadon regi la popolon.

Dio estis kontenta pri tiu peto, kaj Li faris al li ĉiujn donacojn aldona al tiuj kiujn li petis. Pro tio, Dio eĉ donis al li saĝecon, sciadon, riĉon kaj renomon abunde ke neniu estis kiel li antaŭe aŭ poste.

Se vi estus Salomono, kaj oni donus al vi „blankan ĉekon”, kion vi petus? La Sankta Biblio diras jene: ...*celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj ĈIO CETERA ESTOS ALDONITA AL VI* (Mat. 6:33). Jesuo Kristo estas la saĝeco de Dio (1 Kor. 1:24). Estas kaŝitaj en Li trezoroj de saĝeco kaj scio (Kol. 2:3). Unue petu Lin ke Li konduku vin, kaj ĉio alia estos aldonita abunde al vi.

En la servo de Dio

**pastoro Bayo AFOLARANMI**

**Ernesto Cardenale:**  
**El la „Libro pri amo”**

## LA HOMECIGO DE LA HOMARO

Kristo klarigis al ni per multaj paraboloj, ke la Dia Regno estas evolua procedo: Tritikero; semo, kiu estas semita en la kampon; feĉo, kiun virino knedas en paston; sinopa semeto, la plej malgranda el ĉiuj semeroj, kiu kiel arbo superas ĉiujn plantojn kaj en ties branĉoj la birdoj de la ĉielo nestas.

Oni povas supozi, ke Li prenis komparojn el la naturo kaj el la ĉiutaga vivo, por montri al ni, ke la ĉiela regno apartenas al la sama procedo de la naturo kaj de la ordinaraj aĵoj. Samtempe Li ankaŭ volis diri per tio, ke la ĉiela regno estas malrapida procedo, tiel malrapide, kiel la stelaro tra milionoj kaj bilionoj da jaroj, kiel la estiĝo de la tero tra longaj geologiaj epokoj, kiam jam malrapide la ĉiela regno formiĝas surtere.

La kosmo ne estas kreita nur el spaco, sed ankaŭ el tempo, aŭ el spaco, kiu estas tempo. Se ni levas la okulojn al la stelaro, tiam ni ne nur vidas tra la spacon, sed ankaŭ tra la tempon. Se ni rigardas malproksimajn stelojn per teleskopo, tiam ne nur la spaco regresas, sed ankaŭ la tempo, ĉar kion ni vidas, rekuŝas multajn jarojn.

Ĉi tiu ekspansio de tempo en la tuta kosmo estas ankaŭ kiel parabolo de la ĉiela regno. *Se vi nur havus fidon, kiel semero de sinapo...*, diras Kristo. Kaj ni ja scias, ke sinapa semeto inkluzivas la tutan sinapan arbon. Ankaŭ la tuta biologia evolucio estas inkluzivita en la unuaj ĉeloj. Ni nur posedas la semojn, senpretendaj, malgrandaj grajneroj.

Kredo signifas, teni en la mano ama-

seton da malbelaj, ŝrumplaj, sekaj semeroj. En ĉi tiuj paraboloj de la semeroj kuŝas profunda sen-

co: la semoj ankaŭ apartenas al la sama geologia arbo de la evolucio. Ni devenas el ili aŭ pli ĝuste, ni estas pli malfrua evoluŝtupo de ĉi tiuj semoj. Kune kun ĉiuj aliaj vivestaĵoj de la faŭno kaj flaŭro ni formas la saman genealogian arbon de la vivo.

La ĉiela regno ne nur estas kiel semero, ĝi estas semero. Ĉelo unua komenciĝis sin dividi kaj plimultiĝi, formante unue la tritikon kaj la sinapan arbon, poste la homon kaj en la interno de homo — kaŝita kiel la planto en la semo — la ĉielan regnon. Kaj same kiel la tritiko kaj la sinapa semeto kaj ĉiu ĉelo devas sin dividi, por ke eblas plimutiĝo, tiel ankaŭ necesas ke la homo unue mortas, por ke la reala, kompleta homo, la mistika korpo formiĝas, ĝis *la korpo de Kristo atingis plenan grandecon*, kiel Paŭlo diras. Kaj en tiu ĉi mistika korpo estas inkluzivita ĉiu vivaĵo, nia tuta genealogia arbo, kiel la birdoj de la ĉielo, kiuj nestas en la supro de la sinapa arbo.

Ĉar la ĉiela regno estas evolucio, biologia daŭrigo de la minerala regno kaj de la faŭno kaj flaŭro kaj ankaŭ de la ho-



mregnoj. Ĝi estas la socialigo de la homaro, kiel Teilhard DE CHARDIN diras.

La Judoj imagis la ĉielan regnon kiel surteran regnon kaj ili ankaŭ pravas kun tio, ĉar la ĉiela regno estas ankaŭ surtera, estas la surtere fondita ĉiela regno, kaj tial ni ankaŭ preĝas en la Patro Nia, ke ĝi venu al ni. La ĉiela regno estas regno, aŭ — kiel ni hodiaŭ dirus — respubliko, socia ordo. La ĉiela regno estas socia komunumo de la kredantoj, spirita Marksismo. Sed la Judoj eraris same kiel la marksistoj hodiaŭ, pensante la ĉielan regnon kiel surtere kutiman reĝimon. Ĉar Kristo diris al Pilato: *Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo*. Do ĝi estas alispeca. Al siaj apostoloj li diris: *Vi scias, ke la regantoj de la nacioj kondukas kiel sinjoroj super ili, kaj iliaj granduloj ekzercas aŭtoritaton super ili. Ne tiel estos inter vi; sed kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via servanto, kaj kiu volas esti la unua inter vi, tiu estu via servisto*.

Do temas pri inversa ordo. La ĉiela regno estas regno sen regatoj, demokrata regno, aŭ kiel Petro diras, »regno el reĝoj«. Jesaja proklamis al ni ĉi tiun regnon kiel veran socian ordon, kiun ni homoj realigu ĉi tie surtere.

*Kaj loĝos lupoj kun ŝafido kaj leopardoj kuŝos kun kapridoj; kaj bovidoj kaj homidoj kaj grasigita brutaro estos kune, kaj malgranda knabo ilin kondukos. Kaj bovino paŝtiĝos kun urso, kaj aliaj idoj kuŝas kune; kaj leono simile al bovo manĝos pajlon. Kaj suĉinfano ludos super la truon de aspidoj, kaj demamigita infano metas sian manon sur la neston de vipuro.* (Jesaja 11, 6-8)

Kristo venis en la mondon por instali ĉi tiun socian ordon. Tiaj regnoj jam ekzistas en kelkaj kristanaj komunumoj,

ekzemple en monaĥejoj, sed sub artefaritaj kondiĉoj kiel en laboratorio. En la monaĥejoj oni eksperimentas sociordon de la estonteco, sed Kristo ne volis instali sian regnon nur sub laboratoriaj kondiĉoj. Lia reĝimo estu la sama ĉie kaj en ĉiuj popoloj, en la tuta homa societo. La eklezio estas la homaro. Kaj nia hodiaŭa eklezio estas la malgranda, modesta semeto de ĉi tiu homaro.

En ĉiuj paraboloj — de la dompatro, de la feĉo, de la nova vino — Kristo komprenigas al ni, ke la ĉiela regno estas naturprocezo, procezo de daŭra estiĝo kaj malestiĝo, kio apartenas al la naturo kaj kio ankaŭ estas leĝo de la vivo: Tradicio kaj revolucio, aventuro kaj ordo, novinvento kaj teni la malnovon. La semero mortas kaj novnaskiĝas, la sezonoj venas kaj iras. La homoj naskiĝas kaj mortas, la tuta vivo estas daŭra renovigo.

Tradukis el la germana eldono  
Siegfried KRÜGER

## ORA ET LABORA

Pramisto havis ŝipeton kun, kompreneble, du remiloj. Sur unu oni povis leĝi la vorton „ora“ kaj sur la alia „labora“: preĝu kaj laboru.

„Kial? — demandis la pasaĝeroj — vi surskribis ĝuste tiujn vortojn?“

„Nu — respondis la pramisto — ni bezonas ilin ambaŭ. Uzante nur 'ora' mi ekskluzive rondiradas dekstren, kaj prenante nur 'labora', mi ekskluzive rondiradas maldekstren. Nur se mi samtempe utiligas ilin ambaŭ, mi sekvas la ĝustan direkton al la aliflanka bordo“.

Tradukis: Jacques TUINDER

## ĈU LA PROTESTANTA EKLEZIO EN NEDERLANDO RESTU SENEPISKOPA?

En novembro 2003 doktoriĝis nederlanda pastoro, Hans KRONENBURG, per disertacio titolita „Episcopus Oecumenicus“, en kiu li alportis brikojn por teologio pri la episkopa ofico en unuiginta reformacia eklezio. Liaj motivoj estas pastoralaj, ekleziologiaj, ekumenaj kaj kulturaj. Li argumentas favore al episkopo elektata, ĉu viro ĉu ino, jes aŭ ne edz(in)iĝinta.

Kiel infano Hans KRONENBURG ofte vizitis preĝejon de la Evangelia Fratara. Pli poste, vojaĝante en Britio, li ĝuis la estetikon de la anglikana liturgio. La belega muziko ankoraŭ; profunde tudas lin.

En la okdekaj jaroj li pastoris en Utreĥto, la urbo de sankta Vilibord, la unua episkopo kaj patrono de la nederlanda eklezio. Dum sia tiea laborperiodo li ĉiutage kvazaŭ „spertis“ ke en tiu urbo dum jarcentoj unu episkopo sekvis alian. Kiam li en tiuj jaroj falis en personan krizon, li sentis sin soleca kaj sopiris personan kontakton kun homo episkopa, ju kun homa vizaĝo, kun aŭtoritato kaj je certa distanco. Ĉiuj ĉi evoluoj kontribuis al tio, ke li komencis pensi kaj verki pri „la episkopo en la Protestanta eklezio“. Kvin jarojn li bezonis por maturigi sian doktoriĝan disertacion.


KRONENBURG opinias, ke episkopo povus havi bonan kaj sanigan efikon en la eklezio, rolante kiel pontifikso (pontokonstruisto) inter unueco kaj plurformeco, inter loka kaj landa eklezioj, inter ofico kaj organiza Strukturo.

Interese estas, ke li emfazas kulturen motivon: la episkopo kiel „vizaĝo“ de la eklezio kaj la konscienco de la socio. „En debatoj pri Eŭropo mankas tia episkopa vizaĝo, direktita eksteren!“

KRONENBURG komprenas, ke abundas protestantoj, por kiuj la enoficigo de episkopo ne estas alloga ideo, sed li konkludas ke tio okazas parte surbaze de historiaj kaj obstinaj antaŭjuĝoj. LUTERO kaj KALVINO agadis kontraŭ elmontrado de potenco, hierarkio, malplena pompo kaj ekstera brilo, sed malpli kontraŭ la episkopa ofico mem.

Kia aspektas la episkopo laŭ la kompreno de KRONENBURG? Li estu inspiranta persono pastoralaj, kiu aŭtoritate parolas, ekumene pensas kaj agas, ade konstruas pontojn, malfermas siajn orelojn antaŭ kredantoj: paŝtisto kiu kunigas la safaron kaj konservas la unuecon.

Jacques TUINDER



## KIU PLEJE DONACIS?

(HELPTEKSTO: LUKO21:1-4)

Jam maturas la tempo esprimi sian amon al Dio per donaco. La Sinjoro, antaŭ ol iu ajn alvenas, alproksimiĝas al la monkesto por kontroli kio okazas. Neniama antaŭe oni sin trudis en tian aferon, kiam oni diservis en la sinagogo. Sed Jesuo estas mirinda homo, Li foje mirigas homojn per raraj faroj. Oni do ne komentas pri Lia decido stari ĉe la kesto. Eble Li celas beni la donacojn kiam ĉiuj jam donacis. Sed neniu scias la kialon, oni do atendas kaj atentis.

Dum oni kantas himnojn homoj vice preterpasas la keston kaj ĵetas siajn donacojn en ĝin. Unue preterpasas la riĉuloj, la pro siaj donacoj grandaj ege respektataj homoj. Eĉ iliaj promenmanieroj kaj majestaj ridetoj antaŭanontas tion, ke ili enmane havas grandajn monsumojn. Ankaŭ oni ne bezonas tro streĉi siajn okulojn por ekvidi kion ili en la manoj portas. Drame ili demonstras ke liaj donacoj estas eĉ pli pezaj ol la sinagogo en kiu ili estas. Sufiĉe malrapide ili iras por ke, se pro iu ajn kialo iuj ne vidis ilin kaj iliajn donacojn, tiuj vidu antaŭ la reveno al la sidlokoj. Nur blinduloj dirus ke li ne vidas la sadukeojn dum ili svingas siajn donacojn la momenton antaŭ enĵeti ilin en la keston, kaj la donacoj dum iliaj veturoj al la fundo de la kesto hipokrite faras surdigajn bruegojn. Tio finfine forigas iun ajn dubon ĉu la donaco estas granda aŭ ne, fidele kaj antaŭjuĝinte sin kiel virtegaj kaj donacemaj homoj, la riĉuloj reiras al siaj sidlokoj por observi kio poste okazos. Ili ĝojas ke Jesuo staras ĉe

la kesto. Li ja nun scios, kontraŭ la eb- la pasinta opinio pri ili, ke ili estas bonaj diservantoj.

Nun momenton antaŭ oni formetas la keston, dum Kristo ankoraŭ observas, malriĉa vidvino subite, sed respektoplene kaj humilege kun io nevidebla al la preĝejanaro alproksimiĝas al la kesto. Malgraŭ tio ke oni ne vidas kion ŝi en la mano havas, oni ne bezonas diveniston por scii ke ŝi alportas etan donacon. Tiom ne postulas aplaŭdon. Tiun virinon oni bone konas. Ŝi ne havas edzon aŭ parencon. Ŝi estas malriĉa kaj do oni antaŭscias kiom ŝi povus donaci. Tia homo ne povus donaci ion valoran. Ŝia donaco pro eteco kaj humileco povas fari neniun bruon. Neniu aŭdis ĝin — nur Dio!

Nun se Dio ne sendus benon, la riĉuloj tamen vivos ĉar ili ne donacis ĉion al Dio; eble pro tio ke ili ne tute kredas al dia rekompenco. Sed la vidvino ĵetis ĉion en la monujon. Do se Dio ne sendus benon, ŝi devus baldaŭ morti pro malsato. Sed ŝi, por demonstri tutan dependecon de Dio, donacis ĉion, kaj laŭ opinio de Jesuo Kristo, je la surprizo de ĉiu ĉeestanta, tiu malriĉa vidvino donacis pli multe ol ĉiu. Kaj neniu sciencisto nek filozofo komprenas tian ĉielan analizon.

Tamen, kiel ŝi alproksimiĝas al la kesto kun ega humileco, kun koro levita al Dio, al kiu ŝi donacas la du leptojn, la tuton kiun ŝi havas, nur la Ĉiopova Kristo povas vidi la monerojn kaj la korton plenplenan de sincera amo al Dio.

Ŝia koro estas kvazaŭ malferma paĝo de libro antaŭ Kristo. Kun tiom da spirita povo, Kristo jam ankaŭ vidis la fierecon de la koro de ĉiu riĉulo kiu antaŭe donacis. Li jam ankaŭ rimarkis, ke ili el abundo donacis kaj do ne sentis ke ili disiĝis de io valora. Kvankam oni ne valorigas la donacon de la vidvino, tamen, pro tio ke postrestas nenio por ŝi, ŝi ja scias ke ŝi jam disiĝis de io grava, kaj tiel ankaŭ opinias Dio.

Pastoro Olúwábúnmi Gabriel  
OSHÓ-DAVIES

## DIECO KAJ HOMEKO DE JESUO KRISTO (1)

Parolante pri la enkarniĝo de la Sinjoro Jesuo, la Biblio per sama forto asertas kaj Lian diecon kaj Lian homecon.

Temas pri mistero, al kiu ni submetiĝas, ne komprenante ĝin tute; Kristo estas Dio, la Sendito de la Patro; kaj aliflanke, li estas „la idaro” de la virino (Gen. 3:15). Kristo perfekte estis Dio same kiel perfekte Li estis homo, dum li vivis sur tiu ĉi mondo. Estas tute neeble apartigi tiajn du ecojn.

Ekde la koncipio de Nia Sinjoro Jesuo, la miraklo de tia unuiĝo (inter Liaj homeco kaj dieco) manifestiĝis. Kvankam li naskiĝis el virino, li estis koncipita de la Sankta Spirito en la korpo de virgulino elektita de Dio (Luko 1:35). Kiam li estis fariĝinta laŭ la bildo de homoj, li same estis Dio kiu elmontriĝis en la karno (1

Tim. 3:16).

Dum Sia vivo kiel homo, Nia Sinjoro, same kiel ĉiuj homoj, soifis, malsatis, konis laciĝon (Heb. 2:17-18). Sed per li manifestiĝis la potencaj faroj de suverena Dio, kiu Li estis. Jen ekzemplo: sur la ŝipeto, dum la ŝtormo, *li estis dormanta en la posta parto sur la kuseno*. Jen ni havas lacan homon, samkiel aliaj homoj. Sed nur mallongan momenton poste, li vekigis kaj leviĝis kiel la Ĉiopova Dio, kaj la vento ĉesiĝis, kaj fariĝis granda sereno. (Mar. 4:36-41)

Gen. 3:15 — *Kaj Mi metos malamikecon inter vi kaj la virino kaj inter via idaro kaj ŝia idaro; ĝi frapados vian kapon, kaj vi pikados ĝian kalkanon.*

Luko 1:35 — *Kaj la anĝelo responde diris al ŝi: La Sankta Spirito venos sur vin, kaj la potenco de la Plejaltulo superombros vin; pro kio ankaŭ la naskotaĵo estos nomata sankta, la Filo de Dio.*

*Kristo, kiu estas super ĉiuj, Dio benata eterne. Amen.*

(Rom. 9:5)

*Fariĝante laŭ la bildo de homoj; kaj troviĝinte laŭfigure kiel homo, li sin humiligis kaj fariĝis obeema ĝis morto, eĉ ĝis la morto per kruco.*

(Fil. 2:7-8)

1 Tim. 3:16 — *Kaj laŭ konsento, granda estas la mistero de pieco: Tiu, kiu elmontriĝis en la karno, praviĝis en la spirito, estis vidita de anĝeloj, pripredikita ĉe la nacioj, prikreditita en la mondo, prenita supren en gloro.*

Hebr. 2:17-18 — *Tial li devis en ĉio similiĝi al siaj fratoj, por ke li fariĝu kompatema kaj fidedela ĉefpastro en la aferoj*

*de Dio, por fari repacigon por la pekoj de la popolo. Ĉar per tio, ke li mem, tentate, suferis, li povas helpi la tentatojn.*

Mar. 4:36-41 — *Kaj forsendinte la homamason, ili kondukis lin kun si, kiel li estis en la ŝipeto. Kaj aliaj ŝipetoj akompanis lin. Kaj okazis granda ventego, kaj*

## DIECO KAJ HOMEKO DE JESUO KRISTO (2)

Se unuflanke estas vere, ke dum Sia vivo Jesuo kovris Liajn diajn glorojn per la humila mantelo de Lia homeco, estas ankaŭ vere, ke dum momentoj Li lasis brili Liajn ecojn de glora Dio. Liaj disĉiploj estis atestantoj de tio, ekzemple dum la aliformiĝo, aŭ kiam li piediris sur la maro.

Li estis *laŭfigure* kiel homo (Fil. 2:8), sed tamen, sen peko, kaj peko ne povis damaĝi Lin.

Pro tio estis en Li nenia ŝpuro de egoismo aŭ orgojlo. Nenia avareco povis naskiĝi en Lia sankta animo.

Ankaŭ la morto de Jesuo kunportas la signon de la plej intima unuiĝo inter Liaj homeco kaj dieco. Li verŝajne mortis kiel homo, *krucumita pro malforto* (2 Kor. 13:4), sed Li eniris la morton kiel venkanto, kaj eliris ĝin *laŭ la potenco de vivo nedetrubla* (Heb. 7:16). Li mortis ne laca

pro la suferoj de la turmento, sed Li mem fordonis Sian vivon, ĉar neniu povis ĝin forpreni de Li (Joh. 10:18). Li mortis tute posedanta Siajn kapablojn, kriante per laŭta voĉo de venko. Per tio, la centestro konvinkigis, ke Li estis la Filo de Dio, kaj agnoskis Lian diecon (Mar. 15:39)

Fil. 2:8 — *kaj troviĝinte laŭfigure kiel homo, li sin humiligis kaj fariĝis obeema ĝis morto, eĉ ĝis la morto per kruco.*

2 Kor 13:4 — *ĉar li estis krucumita pro malforto, tamen li vivas per la potenco de Dio. Ĉar ni ankaŭ estas malfortaj kune kun li, sed ni vivos kune kun li per la potenco de Dio rilate al vi.*

Heb. 7:16 — *kiu estas farita ne laŭ la leĝo de ordono karna, sed laŭ la potenco de vivo nedetrubla.*

Joh. 10:18 — *Neniu ĝin forprenas de mi, sed mi ĝin demetas memvole.*

Mar. 15:39 — *Kaj kiam la centestro, kiu apudstaris kontraŭ li, vidis, ke li tiamaniere ellasis for la spiriton, li diris: Vere ĉi tiu viro estis Filo de Dio.*

*Vi estas la Kristo, la Filo de la vivanta Dio.*

(Mat. 16:16)

*Kaj la Vorto fariĝis karno kaj loĝis inter ni, kaj ni vidis lian gloron, gloron kvazaŭ de la solenaskita de la Patro, plena de graco kaj vero.*

(Joh. 1:14)

→ *ondoj batis en la ŝipeton, tiel ke la ŝipeto estis jam pleniĝanta. Kaj li estis dormanta en la posta parto sur la kuseno; kaj ili vekis lin, kaj diris al li: Majstro, ĉu vi ne zorgas pri tio, ke ni pereas? Kaj vekite, li admonis la venton, kaj diris al la maro: Silentu, kvietiĝu. Kaj la vento ĉesiĝis, kaj fariĝis granda sereno. Kaj li diris al ili: Kial vi estas timemaj? Ĉu vi ankoraŭ ne havas fidon? Kaj ili timis tre ege, kaj diris unu al alia: Kiu do estas ĉi tiu? Ĉar eĉ la vento kaj la maro obeas al li.*

Elmer ESCOTO

El „Ljus i Öster” (Lumo el Oriento), julio 2001

### DRAMA ATESTO

Tri missistoj el Nagalando iradis al la Hemin-popolo ĉe la limo inter Hindio kaj Ĉinio. Post kvin tagoj ili atingis la celon kaj tie ekrakontis pri Jesuo Kristo. Post kelke da tagoj la budhistoj kolektiĝis por fari atakon kontraŭ ili kun la preteksto, ke ilia prediko estas blasfemo kontraŭ ilia kredo.

Du el la misiistoj, Kusum Kuri kaj Kana Mukhin, estis ligitaj je manoj kaj piedoj kaj kuŝigitaj sur la plankon. La trian, Rongatam Odai, ili same ligis, sed traigis kontraŭ muro. Sisteme ili torturis lin, ĉar li apartenis al gento parenca al ilia kaj sciis ilian lingvon.

„Ni venis ĉi tien nur por rakonti al vi pri la amo de Dio, kaj ankaŭ ke vi povas esti savitaj”, spiregis Rongatam dum la battoj de la bastonegoj trafis lin pli kaj pli intense.

Nun, li sangis eĉ pli multe. Tiam okazis io tre rimarkinda. La sango, kiu ŝprucis el lia kapo, sur la muro formis la tekston „Jesuo savas”.

Kiam tiuj, kiuj torturis lin, tion vidis, ili pro timo returniĝis. Ili levis la du aliajn de planko kaj petis ilin klarigi la vortojn sur la muro apud la kapo de Rongatam Odai. Ili respondis, ke tie estas legablaj bonaj novaĵoj, ke Dio volas helpi kaj savi ankaŭ la homojn de la Hemin-popolo.

Interne de la koro de la torturintoj io okazis. Ili malligis la ŝnuregojn de iliaj manoj kaj piedoj kaj petis la missistojn pardoni al ili, kion ili estis farintaj. La famo pri la stranga skribo sanga sur iu muro okazigis, ke homoj el ĉiuj lokoj alvenis por rigardi.

Daŭre de kvin tagoj la misiistoj, elirante de la vortoj „Jesuo savas”, klarigis al la aŭskultantoj la fundamenton de kristanismo kun la rezulto, ke ĉirkaŭ kvindek viroj kaj virinoj ekkredis al la Savanto.

(Komparu Dan 5)

Tradukis kaj adaptis  
Arne LUNDKVIST

## Pastoro Axel KÜHNER, el libro „Transvivaj rakontoj” FORKURO

Iam vivis imperiestro en Ĉinio. Iun vesperon li trapasis la florantajn terasojn de la imperiestra ĝardeno kaj ĝojiĝis pri la beleco de iliaj floroj kaj pri laodoro de la rozoj. — Jen rapidegis lia supera ĝardenisto, kiu suprenkuris la ŝtuparon kaj jetis sin en la polvon antaŭ la piedoj de la imperiestro. „Ho, potenca mastro, aŭdu min! Ĵus mi vidis, kiam mi akvumis la rozarbuston, la realan morton. Tie malantaŭ arbo li explore rigardis kaj minacis min per la pugno. Certe li volas mian vivon. Pruntedonu al mi, mastro, vian plej rapidan ĉevalon „Zephir”, kiu estas pli rapida ol la okcidenta vento, kaj permesu al mi, ke mi fuĝu al Tŝchanga, via plej malproksima palaco, kiun vi kaŝis en la montaro. Ankoraŭ antaŭ la leviĝo de la luno mi povus esti tie, kie la morto ne trovas min. — „Prenu la ĉevalon! Por protekti vian vivon oni devas ĉion riski”.

La ĝardenisto rapidegis al la staloj. Baldaŭ oni aŭdis la arĝentan hufotrapon de la forkuranta ĉevalo. Pensante la imperiestro daŭrigis la promenadon. Sed subite ankaŭ li ekvidis proksime antaŭ si meze en la rozaro la morton. Sed la imperiestro ne estis timema kaj tuj alproksimiĝis kaj bruske alparolis lin: „Kial vi tiel timigis mian ĝardeniston kaj minacas miajn dungitojn antaŭ miaj okuloj?” La morto kliniĝis kaj diris: „Majesta mastro, pardonu ke mi vin kolerigis. Sed mi ne minacis vian ĝardeniston. Kiam mi ekvidis lin tiel neatendite antaŭ mi inter viaj rozoj, mi ne povis retenigi miron. Ĉar hodiaŭ ma-



tene ordonis al mi la reganto de la ĉielo, iri por preni ĉi tiun vian ĝardeniston el via palaco Tschanga hodiaŭ vespere je la leviĝo de la luno. Tial mi miris, ke mi renkontis lin ĉi tie, tiel malproksime de tiu palaco”.

Nun la imperiestro sin klinis respektoplene antaŭ la reganto pri vivo kaj morto kaj li longe rigardis en la kalikon de rozo pensante: ‘Jen rapidegas la viro per la plej rapida ĉevalo, kiun neniu povas kuratingi, fuĝante la sorton li kuras renkonti sian sorton!’

15 *Ĉar tiele diras la Sinjoro, la Eternulo, la Sanktulo de Izrael: Per pento kaj trankvileco vi saviĝus, en kvieteco kaj fido estus via forto; sed vi ne volis. 16 Vi diris: Ne, ni forkuros sur ĉevaloj; tial vi forkuros; kaj: Sur rapiduloj ni forrajdos; tial rapidaj estos viaj persekutantoj.*

Jesaja 30:15–16



## Riski paŝojn de kredo

Legendo rakontas pri maljuna judo el Krakovo kun la nomo Eisik Jekel. Li jam travivis en sia vivo multajn malfacilaĵojn, sed li pro tio ne amareciĝis. Kontraŭe, li konservis al si fidon je Dia boneco kaj potenco. Li estis maljuna kaj tre malriĉa. Sed en lia koro vivis sopiro, ke li povas servi al Dio per ia eksterordinara. Iam nokte li songis, ke Dio ordonas al li migri Pragon. Tie ĉe la ponto al la reĝa kastelo li trovos trezoron. Eisik Jekel vekigis, alligas siajn disŝiregitajn sandalojn sub la piedojn, prenas mantelon kaj migras la longan vojon al Prago. Tie li serĉas la ponton al la reĝa kastelo kaj trovas

ĝin sekure gardata. Ĉiun matenon venas gardsoldatoj kaj ĉiun tagon Eisik Jekel vagadas ĉirkaŭ la ponton kun malfermitaj okuloj kaj oreloj. En sia krednaiveco li serĉas la trezoron. Obeeme li atendas, ĝis li trovos ĝin. Post kelkaj tagoj la kapitano de la gardistoj rimarkas la maljunan judon kaj li alparolas lin: „Ĉu vi serĉas ion? Ĉu vi fiksas rendevuon kun ni? Ĉu vi atendas iun?” Eisik rakontas sian songon. La kapitano ridegas kaj nomas lin malsaĝulo: „Songoj estas ŝaŭmoj. Vi estas stultulo. Tiam ja ankaŭ mi devus esti malprudenta kaj ekmigri, ĉar mi antaŭ jaroj songis, ke mi migru al Krakovo kaj tie ĉe maljuna judo, kiu nomiĝas Eisik Jekel, fosas sub sia forno pro trezoro. Ne tio ja efektive estas stultajo!”

Eisik Jekel sin klinas, prenas la mantelon, migras hejmen, fosas sub la forno kaj trovas grandan trezoron. Pro sia ĝojo li konstruas por Dio belegan preĝdomon.

Dio manifestiĝas kaj kaŝiĝas samtempe. Jesuo montras sian glorecon kaj kaŝas ĝin samtempe. Dio ne kuŝas surstrate, la grandeco de Jesuo ne estas ekspoziciata en montrofenestro. Oni ne povas simple aĉeti kaj akiri la trezoron de la vivo. Ĝi estas kaŝita. La infana kredo kaj la simpla obeo trovas la vojon kaj vidas la plenumon. Kiu malfermiĝas, en tiu montriĝas Dio. Kiu sopiras, tiu plenumiĝos. Kiu ekiras, tiu trovas la riĉecon de la vivo kaj povas servegi al Dio.

El libreto „Postvivaj rakontoj por ĉiu tago” de Axel KÜHNER, DE  
Esperantigis Siegfried KRÜGER, DE

## MARDO

### (parto unua)

Telefon Alvoko min jam avertis: estas situacio nepre serioza, kriza: la dua mortinto en eĉ ne duona jaro, kaj granda timo antaŭ la loka ortodoksa pastoro. Kaj ĉu mi — kiel neŭtrala eksterulo — ne povas helpi?

Mi aŭtis tien; estis distance de mia hejmo, sur alia insulo. Plurajn dekojn da kilometroj tra poldera pejzaĝo senarba, vasta, ebena ĉiudirekte, ĝishorizonte. Tian pejzaĝon ho kiom mi amas! Riĉa greno inundas...

Estis en unu el la fame konataj tre pie kalvinismaj vilaĝoj. Tion tuj rimarkas la alvenanto, precipe dimanĉe: tiam ja anserpaŝe iradas preĝejen tutaj familioj, la patro iom antaŭ la patrino, la infanoj — ofte multegaj — manenmane ĉu sekvas ĉu antaŭiras, ĉiuj en nigraj vestaĵoj (por memori sian pekemecon) — kaj la inoj, eĉ se nur tri- aŭ kvarjaraj, ĉiuj senescepte kun surkape nigra ĉapelo kun blanka — ho frivolo! — rubando. Kelkfoje, se knabinoj deksepdekjaraj iras kune, kio povas okazi se hazarde malsanas unu el la gepatroj, ili portas la ĉapelon enmane ĝis ili venas en viddistancon de la vilaĝa ĉefpreĝejo; tiam tuj ili surkapigas la ĉapelon. La virino ja devas teni la kapon kovrita — la virino devas obei la aŭtoritaton metitan super ŝi.

Survoje, en mia aŭto, mi havas la trankvilon pense retrakti la hodiaŭan matenon. Kelkajn vizitojn mi jam faris, en oldulejo. Estis la kutimaj vizitetoj — ĉefe al oldulinoj. La virinoj ja averaĝe fariĝas pli maljunaj ol la viroj:

la fortika sekso estas ili, malgraŭ mala dirkutimo. Krome en ĉiuj eklezioj, kaj la nia ja ne faras escepton al la regulo, la virinoj konsistigas la grandan plimulton. Ĉu ne jam estis virino, ĉe kiu komenciĝis la Biblio? La profetino Ĥulda ja siatempe sciigis, je la nomo de JHVH Dio, ke la rulaĵo, la libro, kiun oni estis trovinta en la Jerusalema templo okaze de la restaŭro, ke tiu vere devenis de JHVH Dio, kaj ke sekve do ĉiuj minacoj troviĝantaj en ĝi (ja estis abundego, ĉu ne?) realiĝos super la popolo, ĉar jam de generacioj ĝi neniel plenumis la ordonojn de Dio, kiujn eblis legi tiulibre. Kaj tiam reĝo Joŝija ekaĝis kiel vera tirano senindulga: li estiĝis gigantan revolucion religian en sia lando: li perforte devigis la tutan popolon obei la vortojn de JHVH Dio skribitajn en la libro.<sup>1</sup> Kaj, kvankam eble ne multaj tion konscias, fakte tiu eldiro, tiu orakolo de tiu eĉ ne fama profetino estis do iasence la komencopunkto el kiu formiĝis niaj biblioj: pro ŝiaj vortoj kaj pro la reagoj kiujn ili vekis, laŭ la fakuloj, tiu eta librorulaĵo elinter la rubamasoj de la templo fariĝis ne nur ia malnova verko el tempo de la pragepatroj, ne nur ia antikvaĵo eble respektinda, sed Verko obeenda, nome de JHVH Dio mem. Do ĝi fariĝis *Biblio* en plej strikta senco.

<sup>1</sup> 2 Reĝoj 22 kaj 23. La koncerna libro estas la kerno de nia nuna *Readmono*.

Kvankam, kompreneble, ankoraŭ estis longa vojo irota antaŭ ol formiĝos finfine post jarcentoj la Torao, des malpli la komplete kristana Biblio... — kiun tiom da homoj troadoras, idoligas, diigante ĝin kvazaŭ ĝi mem estus Dio por ilia vivo; — kiun krome tiel malmulte da homoj prenas vere serioze en ĉiuj ĝiaj flankoj, kune kun ĝiaj kontraŭdiroj; kune kun la historiaj, la evoluaj flankoj.

Virinoj ja estas la plimulto en ĉiuj eklezioj, ankaŭ en la t.n. ortodoksaj.<sup>2</sup> Dimanĉmatene tion eblas ekzakte prikalkuli. Kie la viroj ne jam mortis, ofte ili scias trovi elturniĝojn, malsaneton nur dimanĉan aŭ lacecon aŭ ... Foje jam povas sufiĉi simpla mi-ne-emasvirin! Kaj ankaŭ en oldulejoj la virinoj nombre grande superregas, la viroj tie estas raraj ŝafoj, pri kies apudeco dum la kaftrinkado oni foje iom envias sin reciproke.

Unu sinjorino, kiu pasintan monaton estis al si rompinta la kokson per terure artefarita kokso! — kaj la kokso jam estis artefarita kokso! — kaj kiu devis pasiĝi plurajn semajnojn en la malsanula alo, fartis mirinde pli gaje ol pasintfoje. Kvazaŭ la falo skuus al ŝi la sentojn, tiel ke forlikigi la malagrablajn.

Alia nur grumbladis kaj plende lamentis gurde pri la forrestado de l' bofilino. Ja tute apude ŝi loĝas, en la urbeto mem, sed ho kiam ŝi venas? Ĉu ĉiudimanĉe? Ĉu ĉiun duan semajnon? Ne — eĉ ne ĉiun monaton ŝi venas. Kaj

<sup>2</sup> Mi tre ŝatas la distingadon inter Ortodoks- = laŭ la ĝusta instruo; kaj Ortodoksi- = laŭ la orientkristanaj ritoj. Ekzistas ortodoksaj protestantoj, kiuj pri Greka aŭ Rusa Ortodoksio komprenas nenion, eĉ ne volas kompreni.

tiam kutime nur por kelkaj du aŭ tri homoj! Oni malzorgas la oldajn nuntempoj! Ho, pastoro, vi ankoraŭ estas juna — vi tion ne jam komprenas, ne sentas persone. Kompreneble, mi neniel plendas ke vi ne venas al mi pli ofte ol dufoje monate, vi ja havas tiom da aliaj homoj al kiuj vi devas iradi, — sed ŝi — kion ŝi havas por fari? Nur unu etan filon ŝi havas. Imagu, se siatempe mi estus aginta same al mia bopatrino, kiam tiu estis en mia aĝo! Ho — tiu loĝis miahejme ĝis la morto. Ja en mia tempo oni ankoraŭ havis estimon por la pli olda generacio. Respekton. Sed, pastoro, ĉu mi rajtas demandi: ĉu eble okazis io speciale grava en nia eklezia komunumo? Lastamonte mi ne vidis vin ĉi tie, ĉu ne? Vi ja ne venis hazarde, je momento de mia foresto, ĉu? — Nu, kompreneble, ke ne tiun hazardon mi trafis, — mi simple ne venis pasintmonate. Mi estis okupita. Sed kiel vortumi tion tiamaniere, ke kaj sonu afable kaj samtempe estu klare?

—Sinjoro! En la koridoro pli poste flegistino min haltigis. — Sinjoro! Ĉu vi estas pastro aŭ pastoro? (Ĉe ni laŭ konfeso oni tiujn vortojn akre distingigas: pastroj estas la romkatolikaj. Mi do pastoris.) — Jes, sinjorino: pastoro. — Des pli bone, ŝi perfidis sian senton. Ho ve! Pardonon: ne, kvazaŭ mi havus ion kontraŭ ili, ili ankaŭ ja kredas je Dio, sed — ŝi daŭrigis haste — : en ĉambro nr 267 estas sinjoro, kiu specife petis, ke mi voku por li pastoron, nepre ne romkatolikan. Li ja ne estas romkatolika. Tial do. — Kio estas al li? Ĉu malsana, ĉu io alia, kiom vi scias? — Ne, sed li petis ke mi venigu pastoron al li, se okaze estos eble.

Bone, mi do tien. Ĉambro 267, unu

etaĝon pli alte. Antaŭ la pordo mi haltas, legas apud la sonorilo la nomon. Sufiĉe kutima nomo. Nenio speciala. — Mi sonorigis.

— Envenu, sonis rompiĝema voĉo. La pordo ne estas ŝlosita. Vi nur puŝu. Envenu do. — Mi eniris. En la ĉambro kuŝis sur longa ripoz-seĝo sinjoro tre maldika, kun vangoj faltiĝintaj, magraj. Liaj pojnoj aspektis kvazaŭ bastonetoj tuj ĉe ektuŝo rompiĝontaj. La kapo estis kalva. La okuloj, kiuj tre ardis, estis elstaraj el la okulkavaĵoj. — Kiu vi estas? li demandis. Mi ne konas vin. — Mi estas pastoro; mi hazarde pasis tra la koridoro kaj unu flegistino min petis ke mi iru viziti vin. Ŝi diris ke tion vi petis. — Ho ŝi pravas. Mi vere tion petis, jam antaŭ pluraj semajnoj. Vi venas ĝustamomente. Mi min ne sentas tre bone. Eble baldaŭ venos al mi la fino. Neniu povas scii tion. — Li tuis kvazaŭ substrekante. — Mi havas kanceron je la pulmoj, li klarigis. Tial ofte mi tusetas, foje min sentas devigita ĉesigi la paroladon. Mi rapide laciĝas. Do bv kompreni, se foje mi ion lasos sen respondo. — Bone, mi agnoskis.

Kaj ni iom interbabilis. Pri kio? Nu. Ne pri plej profundaj temoj, — pri la simplaj aferoj de la homa vivo: la virinoj, la soleco de senedzina viro en vilaĝeto, en kiu ĉiu ĉiun konas, kie do ne eblas eĉ viziti putinon sen ke tion eksciu tuj la tuta loĝantaro. Li estis dum tuta la vivo profesie tre okupita: en mezlernejo li instruis geografion, al pluraj generacioj li instruis, ofte novajn infanojn li senplie identigis jarkomence, dirante ke „vi certe estas filo/filino de Tiu kaj Tiu“, ĉar trajtojn li rekonis envizaĝe. Kaj kutime li pravis. Ege li amis siajn klasojn, sian laboron. Estas bele instrui al junu-

laro pri io, kion oni mem opinias senchava. Kaj senchava ja estis lia fako! kiu ne bezonas geografion! Ja ĉiu, ĉu ne?

Kaj li plu rakontis, — ravite, ke finfine li havas publikon: parencoj al li mankis komplete. Li naskiĝis solinfano, neniam edziĝis — amikoj aŭ malaperis ien en la vastan mondon aŭ mortis. Tio estas la ĉefa pesto de l' oldeco: ke formortas ĉirkaŭ vi ĉiu, kiu onin ankoraŭ konas je la karesnomoj knabaĝaj, ke malaperas ĉiuj, forfalas, flanke de oni, kiuj memoras pri onia juneco. Soleca li ofte sin sentis, en ĉi granda oldulejo kun la preskaŭ 450 ĉambroj, kun la flegistinoj kaj flegistoj, la kuracistoj kaj kuracistinoj, la loĝantoj kaj loĝantinoj... tiom da vizaĝoj, tiom da malsamaj vizaĝoj ĉiusemajne denove... Kiu inter ili estus konstanta, kiu estus ade videbla, revidebla, rekonebla?... Kelkajn maljunajn virinojn kelkfoje ĉe la kaftrinkado en la granda salono sube li rekonas, ilin li vidas tie regule, sed ili ja restas fremdaj al li, nenion vere komunan li sentas kun ili. Ili ja estas — vere ili ja estas afablaj — sed ... kiel diri... al ili mankas io esenca... mankas...

Li hezitis iom da tempo. Mi ne interrompis lin, silentis respektive. Kion pensas, kion suferas tiel maljuna cerbo? Ĉu vortojn li serĉas? Ĉu memorojn? Ĉu suferon li provas forpuŝi? — Finfine ĉiu homo iel ja estas absolute soleca, plej funde. Certe kun sia angoro aŭ sia ĉagreno. Kio estus lia vivo-vundo?

Li hezitis, atendis, kaj subite rigardis al mi rekte en la okulojn. — Mi ne scias, ĉu vi ŝatas rigardi kun mi kelkajn malnovajn fotojn? Li preskaŭ pete eligis. — Bone, montru, mi diris. Montru do. — Li stariĝis, ege pene, kaj paŝ-ŝoviĝis babuŝe al tirkestaro. El la dua tirkesto

desupre li prenis amaseton da fotoj ni-grablankaj. Li ree kuŝiĝis, mangestis al mi ke iom mi avancu, pli apuden. Tion mi faris. Li diris: Mi estis senedzina, la tutan vivon mi ne trovis la virinon kiun mi serĉis, vi ja scias, junaĝe oni revas al si idealbildon kaj kiam venas la veraj junulinoj, ili ne estas idealaj, kiel la revoj. Do sola mi trairis la vivon. Mi instruis, mi diligente kaj tre laŭdeve plenumis mian laboron en la lernejo.

— Jen foto de unu el la ekzamenaj klasoj: kiel fiere ili montras la diplomon, ĉu ne? Tiu — kaj li montris svaĝan makuleton sur la foto — tiu dekstre de mi, estas Andreo, talentita knabo, pli poste eĉ studis universitate — pri geometrio. Li fariĝis doktoro. Ankoraŭ pasintan jaron okaze de Kristnasko, li sendis al mi bildkarton. Tie ĝi pendas. — Pene li sin turnis, por indiki la karton. — Kaj sur tiu ĉi foto, jen tie mi staras antaŭ la klaso. Estis 4B, mi kredas, en 1951. Tio estis ankoraŭ en nia malnova konstruaĵo, ĉar en la sesdekaj jaroj oni konstruis novan. Pli laŭmodan, certe, nekontesteble, sed la etoso estis for. La malnova vere spiris ĉiupore, dum la nova... Kie ĝi do estas? — Li foliumis la fotojn, fine ĝin trovis. Montris. — Konstruaĵo kia nuntempe ekzistas centoj. Senanima. Li plu turnis la fotojn, foje komentis, foje nur transdonis.

Subite jen foto kun tuta aro da komplete senvestajaj knabinoj. Meze inter ili juna knabo larĝarida. — Jen mi, kiam mi estis en Kasablanko, estis ferio, en la fino de la 40aj jaroj, mi kredas. Se edzinon oni ne havas, oni ja rajtas foje elekti iom alian eblon, ĉu ne? Tiu jen, kiu sidas al mi sur la genuo, — li montris alian foton pli malpli samspecan, iom pli aŭdace fotitan: ŝi vere estis ra-

va. Ankoraŭ longan tempon mi revis pri ŝi, ree en mia hejmvilaĝo. Sed kompreneble la fotojn mi montris al neni. La homoj ĝin ne estus komprenintaj. Ili tiom hipokritas ĉi tie, tion vi ne prenas por ebla: multaj umas kun alies edzinoj, sed ho ve, se sennupta knabo iom organizas kun senedzina knabino! Tuj ili regalus vin per galo kaj lafo! Precipe la pastoroj! (Ŝajne el la memoro forglitis mia pastoreco.)

Tiel ankoraŭ longe daŭris. Foton post foto li montris, kaj prikomentis. La ega plimulto kompreneble estus senprobleme prezenteblo eĉ al plej prudaj personoj — sed ke ankaŭ tiujn kun la nudulinoj li montris al mi, sian veran trezoron tiom zorge gardatan de jardekoj, tion mi opiniis ege valora donaco de konfido. Fine mi atentigis lin pri la tempo: aliaj homoj min ankoraŭ atendas, mi devas for. — Li konfesis, ke li tre ĝuis la viziton, ĉar dum tiom da monatoj neni viro plu parolis al li. Nur virinoj lin ĉirkaŭas — ho, ja kun plej bonaj intencoj... ili privartas lin skrupule, la flegistinoj... kaj afablaj estas la oldulinoj kiuj venas sidi apud li ĉe la kaftrinkado... sed... virino ne estas viro... kaj al li jam longe mankas vere vira kunulo, iu kun kiu eblas parole tuŝi aferojn tipe virajn... Ekzemple tiujn fotojn kun la ĉarmulinoj en Amsterdam, en tiu saŭno: ĉu ne ravaj? Sed imagu, ke tiujn mi montrus al la najbarino de 265... ŝi la ŝokon ne postvivus...

Neniam mi tiel klare konsciis ke solecaj povas esti la malmultaj viroj en niaj oldulejoj.

La farmdometo, kien mi estis vokita, situis iom ekster la vilaĝo mem. Estas digo tra la poldera lando, kiun oni sekvu de la vilaĝo-centro direkte al la ma-

ro. Post kelkdek kilometroj ĝi turniĝas dekstren kaj iom pli poste disdubiĝas. Kaj ĝuste antaŭ tiu disforkiĝo mi devis sekvi ne la ĉef-vojon, sed la vojeton sur la dekstra deklivo kiu forlasas la digon mem. Sube estis eta placo nepavimita kun kelkaj aĝaj arboj, tenejo, kokinejo kaj dometo. El la dometo eksturmis al mia aŭto hundo bojanta. Mi opiniis saĝa resti enaŭte ĝis iu venos forvoki la beston. — Huŝ, sonis forta virina voĉo. Estas bona persono, for vi besto! — Kaj mi elaŭtiĝis. — Sinjorino Bok, ŝi sin prezentis. Mi telefone parolis kun vi. Envenu. Sed bonvole ne atentu la malordon, ĉar la nunaj tagoj estas sufiĉe ĥaosaj. Mia edzo estis ege malsana la lastajn monatojn, kaj precipe la pasintan semajnon estis irado kaj forirado de homoj, parencoj, najbaroj, kuracisto... ni ne plu povis atenti pri la stato de la hejmo mem. Sed eniru do vi, mi petas. — Ŝi antaŭiris min tra etan pordon. La dometo estis certe kelkcent jarojn aĝa, tre malgranda, pajlokovrita. Ene ĝi konsistis el du ĉambretoj, unu por sidi — la „bela ĉambro” — kaj unu por dormi (ĝin oni tenis fermita, kompreneble), kaj kuirejo. Necesejon plej primitivan mi jam estis rimarkinta en la korto apud dika arbo. Eĉ mirige, ke elektron ili jam havas. Kelkaj tiaj dometoj ne jam konas elektron. Kvankam tio fariĝas maloftaĵo nuntempe. La ĉambreto estis plenŝtopita; ŝajne la tuta parencaĵo kunvenis. Olda sinjorino leviĝis kaj sin prezentis: S-ino Bok, la patrino. — Miajn kondolencojn, mi diris. Ŝi prezentis min al la ceteraj. Tiam mi devis sidiĝi sur la granda seĝo: — Tie Dirk ĉiam sidis, diris la ĵusa vidvino klarige. — Kion vi trinkas, kafon aŭ teon? — Teon.

Infano tuj forkuris por la teo.

Mi min sentis iom ĝenita; tiom da fremdaj homoj krom la tuja familio; kion ili faras ĉi tie? Ĉu ili planas prepari la diservon ĉiuj kune? Kian sinteton mi havu? — Mi decidiĝis ke unue mi estu atendema. Ili mem traktu kio por ili gravas. Mi vidos.

Ekstere bojis la hundo. La suno brilis tra la branĉoj de la arboj. Lontane videblis kelkaj bovinoj. Aŭto pasis laŭ la digo, brua tranĉo en la sensona posttagmezo.

Antaŭ kvar monatoj mortis la patro de l' mortinto. Ambaŭ pro kancero, feliĉe ke ĉe ambaŭ la suferado ne daŭris ekstreme longe. Kune ili jam de multaj jaroj prizorgadis la etan entreprenon: estis farmejo kun kelke da bovinoj, iom da kulturata agro, tre senpretende. Estas peza laboro. „En la ŝvito de via vizaĝo vi manĝos vian panon”, aldonis la juna vidvino sentence. Vere, tiel estis. Kvar idojn ili havis, unu knabon — mi jam konis lin: Anton, eble sesjara, tre timema antaŭ tiom da homoj, kiuj tiel serioze parolis strangajn aferojn, por li nekapteblajn — kaj tri filinojn. La pli aĝa jam amindumis plurajn monatojn kun filo de najbara farmisto; nun ŝi estis for, ankoraŭ ne atingita, ie en la urbo. — Tuj denove mi iros telefoni al ŝia gastejo, ŝi ja devas esti trovebla antaŭ la enterigo, ĉu ne? Infano kiu ne ĉeestus se oni enterigas la patron — imagu, kia skandalo. Jam nun oni tiel multe klaĉas pri ni en la vilaĝo... Ambaŭ aliaj filinoj, pli malpli dekkvin-deksesjaraj, sidis inter la adoltaj personoj kvazaŭ senpensaj hundetoj fidel-okulaj...

Antaŭ kvar monatoj mortis la patro de l' mortinto. Li, kiu neniam plendis dum tuta sia vivo, kiu eltenis senvorte ĉiujn sortobatojn, kiu eĉ ne sakris oka-

ze de la granda inundo de 1953, kiam pli ol du trionojn de la insulo en unu sola nokto forglutis la maro, mortigante multajn centojn de homoj, dum la ceteraj miloj forfuĝis sur kio ajn drivipova... li subite eklendis unu tagon pri sia stomako, kaj kiam post kelkaj semajnoj li denove plendis, ke serioze tamen doloras al li, tie enstomake, kaj diris ke oni iru serĉi kuraciston, nu tiam ĉiuj tuj komprenis, kiel serioze status pri li. La sekvan semajnon li mortis. Hepatkanĉero, laŭdire.

— La enteriga ceremonio estis infero. La loka pastoro — de la granda preĝejo, ŝi mangeste indikis la ortodoksan kirkon — sentis sia devo eldiri prediketon kaj preĝon. Ho ke tion li estu ne farinta! S-ro Bok neniam vizitis la preĝejajn diservojn. Dimanĉe, kiel ĉiutage, li laboris en sia farmlaboro, metis fojnon al la bestoj, nutris kaj trinkigis ilin, prizorgis la agron, inspektis, unuvorte: diligente faris sian eblon por ke floru la eta entrepreno. Estas ja ege penige, kun tiel malriĉa grundo kiel ĉi-flanke de la insulo. Aliaflanke la grundo estas multe pli fekunda, sed tiun parton jam de jarcentoj okupas la romkatolikoj. Ĉi-flanke en la 17a jc kuniĝis la malriĉaj protestantoj... Nu, la olda Bok neniam vizitis la diservojn. Eble li eĉ apenaŭ estus kompreninta, kion diras la pastoro. Ne, ke li estus senpia, senfida je Dio... ho ne... Li ja sincere sin sciis ligita al Dio, sentis sin dependa, submetita al la kapricoj de la naturo. Sciis ke ĉion siamane tenas sole nur Dio, la farinto, la kreinto... Sed kial pro tio iri preĝejen, ĉiudimanĉe? Kial aŭskulti komplikajn predikojn? Ĉu tio kreskigas pli rapide la spikojn, ĉu tio la bovinojn igas doni pli da lakto? Li dumlabore preĝis, siama-

niere, senvorte eble, sed nepre ne malpli sincere. Foje iom blasfeme, eble, se denove io ne funkciis, se la kokinoj ne metis sufiĉe da ovoj, se la fojno diabla malsekiĝis pro subita ekpluvego, ĵus antaŭ ol eblis entenejiĝi ĝin... Sed kiel ajn, li ja ne estis pagano, li ne estis senfidulo, ne li... Sed kion diris tiu pastoro? Kun sia nigra bela togo, kun la eta blanka pendkolumno, la pastoro dum la enteriga ceremonia diservo predikadis insulte kaj preskaŭ moke pri tio, ke Dio ne amas la malpiulojn, ke Dio abomenas la homojn de malbono, kiuj neniom zorgas pri Lia volo, kiuj malzorgas Liajn padojn kaj neniam sin turnas al Li... Li predikis pri infero kaj eterna kondamniĝo, kvazaŭ estus plej absolute vere, ke Bok nepre troviĝas nun tie inter la trioble malbenitaj diabloj mem, meze inter la sakritaj paganoj, kiuj siatempe murdis la sanktajn martirojn... Li predikis pri la Dia puno, ĉar Tiu ne lasas senvenĝa tion kion misfaras la homo, eĉ ĝis la tria kaj kvara generacio iras Lia venĝemo! Kaj kvazaŭ skande sonis lia voĉo, kiam la tro konatajn vortojn li ripetis.

— Vere, estis infero: sidi tie meze de la ceteraj, meze de l' vilaĝanoj, meze de la infanoj kaj parencoj, kaj nur senhelpe esti devigita elaŭskulti tion ĝisfine — tiun lavangon da teruro! Kaj samtempe scii, plej intime scii: ne tia li estis! Bok ne estis malpia, li neniel estis ebriiĝema, li ne batis la infanojn nek la edzinon, li ne mistraktis sian filon nek siajn brutojn, li ne skoldis Dion se io iris mise... Li estis senplie bonkora homo, kiu devokonscie laboregis la tutan penoplenan vivon... Li nur vivis por labori, laboris por vivi. Li ne povis fari ion alian... Li zorgis, klopodis ĉiel eble por

la siaj, ja ne estis lia kulpo se la grundo ne tiom fekundis kiom ĉe la alia ekstremo de la insulo... Li sciis elkreskigi el ĝi, kiom nur home eblis... Li eldevegis el la grundo ĉiun ĝian riĉon, ja eĉ pli... Kaj la povraj bovinoj, nu ne multaj estis ili, sed ja bone vartataj, regule melkataj, tute sanaj, senmalsataj, eĉ vintre... — Kaj tian homon la pastoro do predikis en la inferon! Li ne ĉiudimanĉe iris preĝejen. Li ne kurbigis la kapon antaŭ la pastoro, se tiun hazarde foje li renkontis ie. Li tenis sian kapon levita, digne, konscia pri si mem. Li ne ŝajnis alia ol li estis.

Estis terura diservo. Kaj ankoraŭ longe la tuta familio suferis pro ĝi. Kaj la vilaĝo ne lasis ilin forgesi ĝin rapide... Fakte nur la ega malsano de l' juna Bok kapablis portempe flankenpuŝi la ĉagrenon, la vundatecon.

Gerrit BERVELING

## Nova aranĝo LA TUTA BIBLIO EN ESPERANTO

Biblia Sabat-Dimanĉo 30.04.-2.05.2004 okazos en Bad Wimpfen, Sud-Germanio. Oni prezentos la du-akanonajn librojn de La Sankta Biblio, nun haveblaj kiel libro kaj kiel CD. Okazos Diservoj kun ADORU. Krome oni prezentos la novan festlibron ESPERANTE KAJ EKUMENE honore al pastro Adolf Burkhardt.

Informas: Bernhard Eichkorn, Römäusring 20, DE 78050 Villingen, fakso +49 7721 8787 063,

Bernhard.Eichkorn@esperanto.de

## DIO ALPAROLAS SIAJN INFANOJN

### 6. Li estas persekutata

Dum la nokto Dio komisiis al Jozefo: *Leviĝu. Kunprenu la infanon kaj lian patrinon kaj fuĝu al Egiptio kaj restadu tie ĝis Mi avertos vin. Herodo volas trovi la infanon kaj mortigi ĝin.* Jam en la sama nokto Jozefo leviĝis kaj fuĝis al Egiptio kun Maria kaj la infano. Sed Herodo rimarkis ke la magoj ne revenas al Jerusalemo. Li furiozis kaj ordonis jene: *En Bet-Leĥem kaj la ĉirkaŭaĵoj ĉiuj knabetoj malpli ol dujaraj estu mortigitaj.* Post la morto de Herodo anĝelo de Dio diris en sonĝo al Jozefo: *Reiru al la lando Izraelo kaj kunprenu la infanon kaj lian patrinon.* Jozefo leviĝis, reiris kun la infano Jesuo al Izraelo kaj loĝis en Nazareto.

(Mat. 2, 13-21)

### Psalmo 116:5-7

*Favorkora estas la Eternulo kaj justa, kaj nia Dio estas kompatema. La Eternulo gardas la simplanimulojn; mi estis en mizero, kaj Li min savis. Revenu, ho mia animo, al via trankvileco, ĉar la Eternulo faris al vi bonon.*

Patro, grandigu mian koron kaj riĉigu mian amon, por ke mia vivo simulu al ombriĉa arbo, kie lacaj promenantoj trovas ripozon kaj refreŝigon. Amen.

Jelly KOOPMANS-SCHOTANUS

## KION VI TIE HAVAS EN VIA MANO?

Kelkfoje, ni ĉiuj sentas neadekvate, nesufiĉe, nekapable, nekompetente kaj senhelpe fari ion, dum efektive la rimedoj uzendaj por fari la aferon estas je nia dispono.

Moseo troviĝis en tia situacio. Kiel? La Eternulo alvokis lin iri kaj forkonduki la Izraelidojn el la lando de sklaveco. Li provis eviti la plenumon de dia tasko per nekonvinkeblaj senkulpigoj. Li malestimis sin.

Do Dio demandis lin: *Kion vi tie havas en via mano?* Moseo eble pensis jene: „Kiel uzeblas simpla bastono por plenumi tian grandan taskon?” Tamen la „ordinara” bastono fariĝis eksterordinara ilo, kiam Moseo transdonis ĝin al Dio.

Ankaŭ la disĉiploj de Jesuo Kristo haltis antaŭ disdecidiĝo. Ili devis satigi pli ol kvin mil homoj en dezerta loko. Kiel tio fareblas?

*Unu el Liaj disĉiploj, Andreo, frato de Simon Petro, diris al Li: Ĉi tie estas knabo, kiu havas kvin hordeajn panojn kaj du malgrandajn fiŝojn; Sed kio estas tio por tiom da homoj?* (Johano 6:8-9). Kiel ili povis nutri tiom da homoj per la lunĉo de knabo? Ili neniam vidis Dio super siaj kapabletoj. Tamen Jesuo satigis la homojn per tiu „malgranda” nutraĵo, kaj postrestigis dek du korbojn da krompecoj!

Same, vidvino de iu profeto estis perdonta siajn du filojn pro la ŝuldo. Ĝi alkuris profeton Eliŝa por helpo. *Kaj*

*Eliŝa diris al ŝi: Kion mi povas fari por vi? Diru al mi, kion vi havas en la domo? Ŝi respondis: Via servantino havas en la domo nenion krom kruĉeto kun oleo* (2 Reĝoj 4:2). Kiel ŝi forpagu siajn ŝuldojn per tiu „malgranda” kruĉo da oleo? Eliŝa diris al ŝi iri kaj uzi tiun „malgrandajon”. Ŝi plenumis lian ordonon kaj jen forpagis la ŝuldojn, kaj eĉ havigis al si pliel!

Simile, mortis la filo de Ŝunemanino. Sian bastonon Profeto Eliŝa donis al sia servanto, Geĥazi, por ke li iru kaj levu de la morto la knabon. *Geĥazi iris antaŭ ili, kaj li metis la bastonon sur la vizaĝo de la knabo; sed ne aperis voĉo nek sento. Kaj li revenis renkonte al li, kaj sciigis al li, dirante: La knabo ne vekigis* (2 Reĝoj 4:31). Li havis neniom da kredo. Li ne povis vidi la eksterordinaran potencon en la „ordinara” bastono.

Honeste rigardu vian propran vivon. „Kion vi tie havas en via mano?” Kion vi havas kiu aspektas „ordinare”, „malgrande” aŭ „signifive”? Rigardu ĝin per okulo de kredo. Vi havas ion, kion aliaj ne havas. Lasu Dion uzi ĝin fari Siajn mirindaĵojn en via vivo. [Ĉar] *la malnoblajn objektojn de la mondo, kaj la malestimatajn Dio elektis, kaj eĉ la nerealajn, por neniigi la realajn; por ke neniu karno fieru antaŭ Dio* (1 Korintanoj 1:28-29).

Je la servo de Dio,

**pastoro Bayo AFOLARANMI**

*Kaj la Eternulo diris al li: Kion vi tie havas en via mano? Kaj li diris: Bastonon. Kaj Li diris: Ĵetu ĝin sur la teron. Kaj li ĵetis ĝin sur la teron, kaj ĝi fariĝis serpento; kaj Moseo forkuris de ĝi.*

(Eliro 4:2-3)